

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Stefan MacGill

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Renato Corsetti

Johan Derks

Magdalena Feifičová

Helmar Frank


Mireille Grosjean

Dennis Keefe

Zsófia Kóródy

Radojica Petrović

Renée Triolle



ilei

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Helmar FRANK: <i>La Paderborna Eksperimento pri Lingvo-Orientiga Instruado</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Pri la lernhelpa efiko de Esperanto</i>	10
Renato CORSETTI: <i>Dankon, Helmar Frank! Kion esperantistoj ŝuldas al li</i>	12
Dennis KEEFE: <i>Profesoro Helmar Frank kaj la espero konigi al neesp-istaj [...]</i>	14
Mireille GROSJEAN: <i>Refari la paderbornan eksperimenton</i>	17
Renée TRIOLLE: <i>Esperanto por liberigi la parolon</i>	18
Johan DERKS: <i>Kiom internacia estas via vorto? – kompletigoj</i>	20
Renée TRIOLLE: <i>Ŝanĝiĝas la lerneja ritmo en Francio</i>	22
Zsófia KÓRÓDY: <i>Regula lerneja agado inter Herzberg kaj Góra</i>	24
Magdaléna FEIFIČOVÁ: <i>Kune komunume laŭ la spuroj de Zamenhof</i>	27
Zsófia KÓRÓDY: <i>Semajnoj de Esperanta Perfektigo (SEP)</i>	30
<i>Kalendaro</i>	31
Mireille GROSJEAN: <i>Vi lernas. ILEI helpas / Nova jaro, nova motivigo</i>	32
<i>El la landoj kaj sekcioj (FR, NL, PL, RS, CH)</i>	34
<i>47-a konferenco de ILEI, Montevideo. Kial en Montevideo(n)? (R. PETROVIĆ)</i>	38
<i>Simpozio de ILEI, Montevideo, 24/25 julio 2014 (R. PETROVIĆ)</i>	39
<i>Informoj pri ILEI, Adresaro de sekciestroj, reprezentantoj, kontaktopersonoj</i>	39

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

Unua vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Dua vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi”, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nespa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford; AdE¹
Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank, Germanio,
Universität Paderborn; AIS²
Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah
Renato Corsetti, Italio, Università degli
Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹
Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹
Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas
Wim Jansen, Nederlando, Universiteit
van Amsterdam
Boris Kolker, Usono; AdE¹
Iona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama Mickiewicza
w Poznaniu; AdE¹
Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie
Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия
Сельскохозяйственного
Машиностроения
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet
u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Fotoj sur la eksteraj kovriloj

Titolpaĝe: *ILEI havas piedon en 60
landoj! Bildo farita de Prakash
Khadka, Katmanduo, Nepalo.*
Dorskovrile: *Oomoto-Centro en la urbo
Kameoka, Kioto, Japanio, kie la 4a
ISOA okazos (vd p. 32)*

Enkonduko

Karaj Legantoj,

Ĉu vi memoras, kiun defion nia prezidanto prezentis en artikolo en IPR 2013/4? Ne?! Do vi ne estas atentema leganto! En sia artikolo pri statistikoj, Mireille GROSJEAN sugestis, ke ni provu havi piedon en 60 landoj en julio 2014. Kaj jen ĉe la jarŝanĝo ni jam atingis tiun ciferon!


Ankaŭ por la nuna numero ni havas malĝojigajn informojn: la 15-an de decembro 2013 forpasis Doktoro Helmar FRANK, fama germana sciencisto, kiu enkondukis la nocion de lernhelpa efiko de Esperanto. Rememore al li, ni aperigas unu el liaj artikoloj, kiun ni ricevis de lia vidvino, membro de Scienca Komitato de IPR. Poste sekvas la rememoroj de kelkaj liaj adeptoj (tiuj de Grosjean, Corsetti, Keefe kaj Triolle). Plia malĝojiga informo, ke ĵus forpasis nia nov-zelanda reprezentanto, Gwenda SUTTON. Pri ŝi aperos nekrologo en IPR 2014/2.

Feliĉe, en la dua duono de nia revuo vi trovos nur ĝojigajn materiaĵojn: ekz. esperigajn novaĵojn el Benino, Francio, Germanio, Nederlando, Pollando, Serbio, Svislando kaj pliajn detalojn pri nia ĉi-jara Konferenco en Urugvajo. La numeron fermas la aktuala adresaro de niaj sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktopersonoj.

Jozefo NÉMETH,
redaktoro

La Paderborna Eksperimento pri Lingvo-Orientiga Instruado¹

kaj la klerigpolitikaj rekomendoj el ĝi dedukteblaj



En pluraj elementaj lernejoj en Paderborn ekmarŝis en februaro 1975 eksperimento celanta plibonigi la lernejan instruadon de fremdaj lingvoj. Aliĝis poste ankaŭ lernejoj en Basa Saksio, Francio, Italio kaj Kroatio. La eksperimento finiĝis komence de la okdekaj jaroj. Pri la pedagogia efektivigo kaj la scienca observado kompetentis nia *Instituto pri Kibernetika Pedagogio* (FEoLL Paderborn). La de ni tiel nomita „Lingvo-Orientiga-Instruado”, elprovita per tiu „Paderborna Eksperimento”, ekmarŝis en septembro 1993 en pluraj lernejoj en Italio, Rusio, Uzbekio, Ukrainio kaj Kazahio en formo de regula

instruado, pri kiu tamen estas planita scienca pritaksado fare de nia *Instituto pri Kibernetiko* kune kun la *Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino*. Estos inkluzivataj ekde 1994 en tiun ĉi pritaksadon ankaŭ eksperimentaj klasoj en Slovenio, Aŭstrio kaj Hungario, same kiel antaŭvideble en Germanio, Rumanio kaj Ĉeĥio.

La Lingvo-Orientiga Instruado (LOI) diferenciĝas *kaj* de la kutima, nuntempe forte propagandata frua instruado de fremdaj lingvoj, *kaj* ankaŭ de la Esperanto-instruado, malofte rekomendita kiel alternativo. La LOI servas al la nekontestitaj celoj de ambaŭ aliaj klopodoj, sen esti trafita de la specifaj objektoj turnitaj al ili. Ĝi povas do esti rigardata kiel sintezo de ambaŭ.

¹ La originalo publikiĝis dulingve en la libro: Reinhard Selten k. Helmar Frank (2005): Por dulingveco en Eŭropo. Argumentoj kaj dokumentoj / Für Zweisprachigkeit in Europa. Argumente und Dokumente. Paderborn: IFB Verlag & Akademia Libroservo, p. 31-38

Kontraŭe al la *frua instruado de fremdaj lingvoj* - nome tiu, kiu normale antaŭvidas jam ekde la tria aŭ kvara lerneja jaro la instruadon de la angla (aŭ, preskaŭ nur en la anglalingvaj landoj, de la franca) la LOI ne devigas lernanton jam en la elementa lernejo (anstataŭ – kio havas sencon – en la mezlernejo, do en la 5a ĝis 10a lernejjaroj) komenci la lernadon de fremda lingvo etna, kun ĉiuj ĝiaj komplikaĵoj, kompreneblaj nur el ĝia historio (kaj nemalhaveblaj por la identigo de la lingvo-portanta komunumo). La LOI preferas *prepari* la lernanton dum la elementa lernejo (en Eŭropo plej bone en la 3a kaj 4a lernejjaroj) *tiel* al la sekvanta fremdlingvo-instruado, ke li povos tiam pli facile lerni unu aŭ pli da fremdaj lingvoj ol sen antaŭa Lingvo-Orientiga Instruado.

Kontraste al la Esperanto-instruado, la Lingvo-Orientiga Instruado *ne deiras de la supozo*, ke la „*Internacia Lingvo (ILO) de Doktoro Esperanto*” jam estus la komuna dua lingvo intencita aŭ saĝe intencenda por Eŭropo se ne por la tuta mondo – kaj tial lernobjekto jam nun instruinda en la elementa lernejo. La LOI, anstataŭe, utiligas la *simplecon* (foreston de superflujaj ornamaĵoj), la *regulecon* (foreston de esceptoj) kaj la *netecon* (modulecon), kiun ILo posedas estante aglutina planlingvo, por stimuli helpe de tiu ĉi *lingva modelo* (kiun tiucele oni *ne bezonas plene ellerni*) komprenon de lingvaj strukturoj kaj intereson por fremdaj lingvoj kaj, pere de tio, por plialtigi la kapablon kaj emon lerni ilin.

En la LOI, kiel ĝi estis realigata en la Paderborna Eksperimento, la element-lernejanoj okupas sin dum unu aŭ du jaroj, dum du horoj semajne, pri celkonforme elektita parto (ĉirkaŭ 500) de la (ĉ. 2000 nefakaj) vortpartoj de ILo. Ĉi tiu parto sufiĉas por krei la vortprovizon bezonatan por infannivela komunikado. Pli grave: ĝi sufiĉas por komprenigi al la infanoj per ekzemploj la preskaŭ kompletan strukturon de tiu ĉi planlingvo kaj por komenci – kontraste kun la gepatra lingvo – pripensadon pri la diverseco de la lingvaj strukturoj. LOI devas do esti interpretata kiel *propedeŭtiko* al la lernado de fremdaj lingvoj.


Kiu ne komprenas la sencon de propedeŭtiko, tiu kutime demandas: „Kial tiu ĉi kromvojo? Kial oni ne komencu tuj per „vera” fremdlingvo? Kial oni (ekster la angla lingvo-regiono) ne tuj ekinstruu la anglan?”

Antaŭ ol (aŭ anstataŭ) respondi surbaze de la klerigkibernetika transfer-teorio, ni referencas al sukcese elprovitaj imitmodeloj el la instruado de natur-sciencoj. Ekzemple la instruado de biologio ja ankaŭ ne senpere

priokupiĝas pri „vera“ homa dentaro, sed iras la kromvojon tra idealigita modelo de ĝi. Tiamaniere, propedeŭtike-kromvoje utiligante tian instruaj-modelon, oni sukcesas pli rapide komprenigi la esencaĵon ol ĉe la vera instruajo, ĉar ĉe tiu fakte perenda instruajo mem la esencaĵo estas kamuflita per diversaj aldonaĵoj, neregulaĵoj kaj kunfandaĵoj.

Sed – oni ofte insiste objetas – la lernanto ja tamen poste devos havi la kapablon, interkompreniĝi per „vera“, nome etna fremdlingvo. Li devos do sukcesi elturniĝi el ĉiuj tiuj aldonaĵoj, malregulaĵoj kaj kunfandaĵoj, kiuj konsistigas la ĉarmon, sed krome en la realo ankaŭ la malfacilecon, de la angla, de la franca kaj de aliaj etnaj lingvoj.

Tio veras – sed la „kapablo elturniĝi“ nun estas multe pli rapide atingebla, oni do poste, en la 5a ĝis 10a lerneja jaro (mezlernejo) ŝparas tempon, kaj *pli da tempo, ol kostis la LOI.* (Vidu bildon 1.)



Bildo 1: Lingvo-Orientiga Instruado (kun diversa daŭro T) ebligas atingi pli frue la saman nivelon, kiun atingeblas en la daŭro D per la tradicia fremdlingvo-instruado (aŭ: en la sama tempo D eblas atingi pli altan nivelon de lingva kompetenteco).

Tiu ĉi aserto unuflanke estas klarigebla per la klerigkibernetika transfer-teorio, kaj ĝi, aliflanke, konfirmiĝis en la Paderborna eksperimento kaj en postaj pluaj esploroj faritaj en Italio. Por lernantoj, kies gepatra lingvo estas la germana, kaj kiuj en la mezlernejo kutime lernas la anglan kiel unuan fremdan lingvon, la Paderboma eksperimento havigis tri ĉefajn rezultojn.

1. Lernantoj, kiuj en la elementa lernejo *ne* partoprenis en LOI, bezonas ĉ. 35%jn pli da tempo por atingi la kutiman nivelon ol lernantoj ricevintaj dum ($T =$) 2 jaroj la LOI-n; kaj ili bezonas 20%n pli da tempo kompare kun la lernantoj partoprenintaj dum nur ($T =$) 1 jaro en LOI. Do: LOI okazanta dum la indikitaj daŭroj T kaŭzas ĉe germanlingvaj lernantoj por la instruado de la angla lernplifaciligon je 35% resp. 20% danke al la tiel nomita „latenta transfero”, do laŭ la transferfaktoro $k = 1,35$ resp. $k = 1,20$. Alie kalkulite: 160 horoj da LOI ŝparigas en la posta lernado de la angla lingvo ($[(k-1)/k = 0,35/1,35$ do:) ĉ. 26%n; pro ĉ. 80 horoj da LOI la ŝparo estas ĉ. 17% (Bildo 1).

2. Rilate al la kvanto da instruhoroj pri la angla lingvo antaŭvidata en la instruplanoj de la mezlernejo, la maksimuman utilecon havigas proksimume 100 instruhorojn ampleksa LOI, se oni kalkulas surbaze de du supozoj (alikaze LOI montriĝas eĉ pli *avantaĝa*):

(a) Oni atribuas neniom da valoro al la tiel akiritaj ILO-konoj pro si mem.

(b) La konsiderata lernplifaciligado (transfero) koncernas nur la instruadon de la unua etna lerneja fremdlingvo.

La transfero tamen estis mezurita *ankaŭ* *rilate la instruadon de la gepatra lingvo*, kaj la lernado de la planlingvo ILO provokas ankaŭ pli grandan intereson pri la eŭropaj lingvoj, pri iliaj portantaroj kaj ties landoj, kio montris pozitivan influon *ankaŭ* al la lernado de geografia.


3. La cititaj tempo-ŝparoj empirie eltrovitaj estas *averaĝaj valoroj* validaj por lernejoj de la (malplej postulema) *ĉeflerneja* branĉo de la mezlernejo. Ĉe lernantoj de la (pli postulemaj) branĉoj realerneja aŭ eĉ licea la transfero estas malpli granda. Male ĝi estas *aparte granda ĉe tiuj ĉeflernejoj, kiuj tre malfacile lernas fremdajn lingvojn (la „kurso B”)*. Kiel ĉiu pedagogia apogo ankaŭ LOI do helpas unuavice al tiuj, kiuj malfacile lernas.

La ĉi-supraj rezultoj de la Paderborna Eksperimento kaj de pluaj postaj esploroj, same kiel la teorio de la Lingvo-Orientiga Instruado, estis inter

1975 kaj 1992 – pli detale ol ĉi tie eblus – prezentataj, teorie eksplikataj kaj pritaksataj en multnombraj publikajoj en la germana kaj en aliaj lingvoj. (La plej grandan parton de ĉi tiuj laboraĵoj kaj ankaŭ rilatajn tekstojn pri lingvo-politiko kaj interlingvistiko represigis 1993 V. Barandovská en sia fontarkolekto *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko*. Pluaj originalaj tekstoj troviĝas precipe en la kvaronjara revuo *GrKG/ Human-kybernetik.*)

La akiritaj empiriaj kaj teoriaj rezultoj ebligas pravigi la jenajn klerig-politikajn rekomendojn.

I. *En ĉiuj eŭropaj elementaj lernejoj okazu en la tria kaj kvara lerneja jaro Lingvo-Orientiga Instruado - anstataŭ (sur ĉi tiu ŝtupo tro frue!) jam instrui etnan fremdlingvon; aŭ LOI almenaŭ estu ofertata kiel alternativo al la tie paralele jam ofertata, frua fremdlingvo-instruado. Se oni en la elementa lernejo neniom da tempo povas disponigi al fremdlingvo-instruado, tiam LOI okazu dum proksimume 100 instruhoroj komence de la mezlernejo, antaŭ la komenco de la kutima fremdlingvo-instruado (Bildo 2).*



Bildo2: La „kromvojo“ tra lingvo-orientiga instruado dum ĉirkaŭ 100 lernejaĵoj rezultiĝas pli bonan finan kompetentecon – aŭ la tradician kompetentecon pli frue.

II. *La lernejoj de la mezlerneja ĉefbranĉo, kiuj post sesmonata instruado de etna fremdlingvo montras nur ekstreme malgrandajn progresojn („B-kurso”), estu liberigataj de ĉi tiu fako. Ili akiru anstataŭe kontentigan komunikadkapablon en ILo per konforma instruado daŭriganta la LOI-n, kiu antaŭe estis nur propedeŭtikcele donita.*

III. *Al ĉiuj ceteraj lernantoj oni devus doni en la mezstupa lernejo aŭ sur la sekvanta gimnazia ŝtupo la eblon, krom la lernado de almenaŭ 2 fremdaj eŭropaj etnolingvoj (plirapidigita danke al LOI), libervole partopreni en progresiga ILo-kurso, por rapide atingi plenan komunikan kapablon en tiu lingvo, nome perfektecon ankaŭ en la aktiva uzado de ĝi, kio por etnaj fremdaj lingvoj estas nur escepte atingebla pere de la lerneja instruado.*

Tiuj ĉi rekomendoj devenas – *unuflanke* – de la teorie kaj empirie pravigitaj ekkonoj:

a) pri la *lernfacileco* sen perdo de esprimpovo akirita por ILo, ĉar ILo estas evoluigita kiel simpla, regula kaj modula planlingvo, kaj

b) pri la *lernplifaciligado* kiel efiko de la propedeŭtika instruado de ILo (kiel fremdlingvo-modelo pedagogie taŭga ĝuste pro tiuj trajtoj) favore al la senpere sekva, plirapidigita lernado de fremdaj etnaj lingvoj.

Aliflanke la tri supraj rekomendoj fontas el la kreskinta kaj sendube por pli kaj pli da eŭropanoj plukreskanta utileco (se ne jam nun ekestinta *neceso*), *diversajn eŭropajn fremdlingvojn* (ĉefe la anglan, la francan kaj la germanan same kiel – en landlimaj regionoj – ankaŭ la najbaran lingvon) *almenaŭ kompreni*, pli bone kapabli per ili kontentige komuniki, *sen neglekti pro tio aliajn lerneajn instruaĵojn*.

Se oni sekvas tiujn tri konsilojn, oni *krome* akiros avantaĝon ankaŭ por la estonta Eŭropo-politiko. Ĉar tiamaniere oni por ĝi ja havigas rimarkindan (ĉar neŭtralan) opcion (alie probable nur utopian) por politika decido, pli aŭ malpli frue farendan sendepende de la lingvo-*pedagogiaj* pripensoj ĉi tie disvolvitaĵ, nome decido pri oficiale enkondukenda, komuna eŭropa interkompreniĝlingvo.

Prof. Dr. Helmar FRANK², Institut für Kybernetik / Universität Paderborn & Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino



² Jen ligoj al Vikipedio kaj Panteono de Edukado net, kun informoj pri la ĵus forpasinta aŭtoro: http://eo.wikipedia.org/wiki/Helmar_Frank,
<http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=55&s=4c3109e9f4d31ad3543b2e7ede6f1d8>

Pri la lernhelpa efiko de Esperanto

Oni lernas plej agrable, rapide kaj efike per modelo. Jen ekzemploj:

Garaĝisto lernas, kiel aspektas motoro, pere de motoro plasta, nefunkci-kapabla.

En kemio oni lernas, kiel aspektas la molekuloj, ludante permane kun plastaj molekuloj, kie la atomoj estas koloraj kugloj kaj la interatomaj ligoj estas bastonetoj.



En anatomio la baldaŭaj kuracistoj disponas je korpo nekarna, kiun ili povas observi, malmunti, remunti, priskribi tuŝante kaj movante la diversajn organojn.

Same okazas pri lingvoj. Esperanto ludas la rolon de modelo. Nun ni vidu, kiajn ecojn lern-modelo havas:

SIMPLA ĝi devas esti. Por-lerna korpo por kuracistoj ekzemple ne havas harojn.

KOMPLETA, PERFEKTA ĝi devas esti. Kuracistoj, kvankam ili vidos malsanajn, mankohavajn aŭ eĉ amputitajn korpojn, lernas pere de kompleta, perfekta, normala korpo.

DISERIGEBLA ĝi devas esti. Por lerni bone, iu persono devas povi permane malmunti, remunti, vidi precize la lokon de ĉiu parto de la tuto. La garaĝisto povas malmunti la motormodelon, kemiisto povas malmunti la molekulojn kaj remunti ilin por montri, ke li/ŝi majstras la taskon. Tiu laboro postulas uzon de diversaj sensoj kaj muskoloj, kaj okazas en tri dimensioj. Plie ĝi povas ripetiĝi iks-foje tra la tempo.



Nun finiĝas la komparo. Tiuj modeloj ne funkcias. Neniam plasta lerncela korpo ŝvitos aŭ digestos. Neniam plasta molekulo ligiĝos al alia molekulo por fariĝi nova substanco. Neniam tia ekzercocela motoro tiros ion ajn.

ESPERANTO ESTAS SIMPLA, PERFEKTA KAJ DISERIGEBLA, kiel bona lerncela modelo. Post lernado de Esperanto iu persono aliros al la lernado de alia lingvo kun plej taŭga preparfazo. Li aŭ ŝi malkovras per Esperanto la bazajn erojn kaj ecojn de iu lingvo. Tiu lernado de Esperanto okazas en pozitiva etoso, ĉar ne okazas bremsoj en la momento de lernado de esceptoj. La lernado estas plezuriga, kuraĝiga. La lernanto povas fidi la regulojn. Tio kaŭzas ĝojon. Tiu suna psikologia aspekto favoras la lernadon, ĉiuj scias tion.

Plie Esperanto funkcias kiel lingvo.

Esperanto estas kaj modelo kaj funkcianta lingvo. Per ĝi oni povas verki tekstojn, poemojn, teatraĵojn, diri amdeklaron, sakri aŭ insulti.

La tri ecojn de lerncela modelo mi eksciis tra Doktoro Helmar FRANK.

Mi ŝatus aldoni aspekton aŭditan de la psikologo Claude PIRON. Laŭ Piron lernanto de nova lingvo devas distanciĝi de sia unua lingvo, de sia denaska lingvo. Tio estas tikla momento, ĉar ĉiu homo ricevas sian denaskan lingvon, siajn denaskajn lingvojn en sia lulilo kune kun la rideto de siaj patro kaj patrino. Se infano kutimas diri „tree” kaj subite devas nomi tiun kreskaĵon „arbo”, tio estas giganta ŝanĝo, ŝoko. Iu homo ligiĝas forte al sia lingvo. Se la lingvoinstruisto malpermesas al siaj lernantoj la uzon de ilia denaska lingvo, tio estas pedagogia tekniko, kiu povas vundi la lernantojn pro la forta ligo inter ili kaj ilia lingvo. Se la lernota lingvo estas E-o, tiu distanciĝo okazas en plej agrabla maniero pro la regulaj ecoj de nia lingvo, pro la fakto, ke la lernanto povas FIDI la sistemon de la lingvo.

Mireille GROSJEAN, fremdlingvoinstruisto dum 38 jaroj

***Juna Amiko pretas veni al vi.
Invitu ĝin!
Abonu!***

Dankon, Helmar Frank! Kion esperantistoj ŝuldas al li.



Apenaŭ kelkaj fakuloj scias, ke pri la lernfaciliga valoro de E-o jam parolis en 1908 unu el la unuaj verkistoj en E-o, Antoni GRABOWSKI. Fakte en la jaroj 1908-1914 Grabowski respondecis pri la unuaj E-kursoj en kelkaj lernejoj en Varsovio. En artikolo en 1908-a li priskribis la ecojn de E-o por enkonduki al la studo de la franca kaj de la latina, kio ŝajnis tre stranga al la tiutempa publiko.

Sed ĉiuj esperantistoj scias, ke Helmar FRANK estas la homo, kiu enkondukis en la Esperanto-mondon la koncepton pri Esperanto kiel lernfaciliga lingvo por lerni poste aliajn lingvojn.

Pri tio, ke oni uzis por tiu koncepto la timindan grekan vorton 'propedeŭtikeco', ne kulpas H. Frank, kiu daŭre uzis la kunmetaĵon en Esperanto 'lern-facil-ig-'.

Fakte la uzo de tiu ideo por altiri homojn al lernado de Esperanto estas la granda donaco de H. Frank al nia movado.

Frank studis matematikon, fizikon kaj filozofion en Stuttgart, Tübingen kaj Parizo de 1951 ĝis 1958. De 1961 ĝis 1963 li laboris en kibernetika esplorgupo gvidata en Karlsruhe. Tiam Frank iniciatis la unuan germanan konferencan programon pri instruado kaj instru-aŭtomatoj. Poste la pedagogia universitato de okcidenta Berlino vokis lin kiel profesoron al kibernetika katedro. En 1984 li fondis tie la Instituton pri Kibernetiko kaj akceptis en 1972 vokon al la (tiutempe fondota) universitato de Paderborn. Dum kelkaj jaroj Frank estis estrarano de la kibernetika asocio *Association Internationale de Cybernétique* (AIC) kaj konvinkis ĝian prezidanton, ke Esperanto estu tria lingvo (apud la franca kaj la angla) ĉe la AIC-kongresoj.

Pro siaj meritoj Frank ricevis la unuaklasan meritkrucon de la Federacia Respubliko Germanujo kaj en la Esperanto-mondo oni elektis lin *Esperantisto de la Jaro 2004*.

H. Frank, do, estis jam konata kiel sciencisto pri kibernetika instruado en neesperantistaj rondoĵoj tra Eŭropo, kiam li ekaktivis pri Esperanto.

Li, tamen, vivis en lando kaj en tempo en kiu la ĉefa problemo estis la lernado de la angla. Pro tio Frank estis devigata evoluigi teorion, kiu pravigus la uzon de Esperanto por posta lernado de la angla. Lia modelo estis prezentita en tre rafinite matematika maniero, kiu kovris la bazan ideon pri ŝparo de tempo per dediĉado de la unua periodo al lernado de Esperanto kaj nur poste de la angla.

Frank profitis sian universitatan pozicion en la universitato de Paderborn por lanĉi en la 70-aj jaroj ambician programon, kies nomo estis „Lingva Orientado”. La praktika eksperimento, kiu okazis en tiu kadro, estis instruado de E-o antaŭ ol instruado de la angla al klasoj en la unuagradaj lernejoj (tria kaj kvara jaroj) en la lernejoj de la germana landoparto Niedersachsen. Entute partoprenis 556 lernantoj, kiuj lernis E-on (parto dum unu jaro kaj parto dum du jaroj) antaŭ ol lerni la anglan.

Oni mezuris la konon de la angla fine de la 5-a kaj 6-a jaroj kaj oni komparis la rezultojn kun tiuj de kontrol-klasoj, kiuj ne estis lernintaj E-on. Laŭ H. Frank la rezultoj montras pli grandan konon de la angla je 20% aŭ 30% depende de la longeco de la tempo, en kiu la infanoj lernis Esperanton antaŭ ol lerni la anglan. La rezultoj estas efektive atentindaj en si mem. Al tiuj oni aldonu, ke la lernintoj de Esperanto havas ankaŭ pli grandajn prilingvajn kapablojn pri la germana mem.

H. Frank kaŭzis sensacion en la Esperanto-mondo per ĉi tiuj tre favoraj rezultoj kaj certe la granda interesiĝo pri la lernofaciliga valoro de E-o en la lastaj jardekoj de la pasinta jarcento estas rekta merito de H. Frank mem. Ni aldonu la fakton, ke H. Frank havis grandan personecon kaj ke li estis tre aktiva ankaŭ ĉar li estis la kreanto de tuta movado ĉirkaŭ universitata instruado kaj Esperanto. Li estis prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj: AIS – San Marino, kiu kunordigis la utiligon de Esperanto por instruado universitatnivela.

Laŭ la ideoj de H. Frank oni daŭre aplikis tiun esplor-modelon, kaj laŭgrade oni komencis esplori ankaŭ pri la efikoj de la lernado de Esperanto al la ĝenerala kompreno pri la funkciado de lingvoj, al la tiel nomataj prilingvaj kapabloj (metalingvaj kapabloj, laŭ la greka dialekto de Esperanto). Oni devas konsideri, ke intertempe en eŭropaj lernejoj, pli en iuj landoj kaj malpli en aliaj landoj, oni ne instruas teoriajn konceptojn pri gramatiko same intense kiel oni faris antaŭ 50 jaroj, tiel ke infanoj apenaŭ komprenas la malsamecon inter, ekzemple, adjektivoj kaj adverboj.

Konklude la rolo de Frank por popularigi inter esperantistoj la koncepton, ke oni utiligu la lernofaciligan valoron de Esperanto por proponi instrui ĝin en lernejoj, estis giganta. Kvankam ILEI subtenis tion, ne estas duboj, laŭ mi, ke la plej granda merito estas tiu de Frank. Ne temas pri malgranda merito, se oni pensas, ke en tiu periodo la eŭropaj esperantistoj renkontis ĉiam pli da malfacilaĵoj proponi la instruadon de Esperanto al homoj, kiuj ĉefe volis lerni la anglan.

Se mi rajtas fini per persona rimarko, li estis unu el tiuj homoj kun giganta personeco, kiuj de tempo al tempo aperas en difinitaj medioj kaj transformas tiujn mediojn. Li estis homo kun vizioj kaj estis tre plaĉe rilati kun li sur la hejma nivelo. Mi volas nur memori por mia propra plezuro konversaciojn kun li pri la estonteco de Esperanto kaj de la mondo en liberaera tablo de kafejo en Karlovo, Bulgarujo, en printempo. Dankon, Helmar!

Renato CORSETTI, <renato.corsetti@virgilio.it>, Italio

Profesoro Helmar Frank kaj la espero konigi al neesperantistaj fakuloj la valoron de lia verkado



Nia kara profesoro Helmar FRANK ne plu estas inter ni. Li forpasis, kiel Ivo LAPENNA, en tiu tre speciala, unika tago por esperantistoj, la 15a de decembro. Dum pluraj jardekoj Helmar FRANK verkadis pri diversaj temoj rilate edukadon, lingvojn kaj aliajn esplortemojn, kaj, kiel ni scias, unu el tiuj temoj estas Esperanto. Se ni kalkulas la nombron de liaj verkoj dum la 1960aj, 70aj, 80aj kaj 90aj jardekoj, ni atingos pli ol 400! Tio estas impona cifero, preterpasata de nur ege malgranda minoritato de eminentaj sciencistoj kaj esploristoj. Nun ni povas nur esperi, ke venontece aliaj fakuloj, iel sekvante la paŝojn de Doktoro Frank, komencos serioze kaj science studi la fenomenon de la lernado de Esperanto kaj ĝian rilaton kun la lernado de aliaj fremdlingvoj. La merito de Frank ne estas, ke li pruvis, ke la lernado de Esperanto plifaciligas la akiradon de aliaj lingvoj, sed ke li provis montri tion, serioze, eksperimente, rigore, science.

Profesoro Frank laboris kaj esploris en la fako *kibernetiko*, ne en la fako *dua lingvo-akirado*. La distingo estas grava. Kibernetiko, bedaŭrinde, ne estas bone konata en la profesia mondo de dua lingvo-akirado, kaj ankaŭ ne en la mondoj de dua lingvo-lernado kaj de lingvo-instruado. Tiu konstato dolore kompreniĝas, se ni trarigardas unu el la ĉefaj studoj de la fako dua lingvo-akirado, la ampleksan verkon „*The Study of Second Language Acquisition*” (La Esplorado pri Dua Lingvo-Akirado) verkita de Profesoro Rod ELLIS. En tiu granda libro ne estas menciata eĉ unu verko nek unu verketo nek unu scienca prelego pri kibernetiko kaj ĝia apliko al lingvo-instruado. Ne eĉ unu. Tamen la bibliografio de tiu scienca libro estas tre longa, kun ĉirkaŭ 2000 verkoj pri lingvo-akirado. La laboro de Helmar FRANK, en la profesia mondo de lingvo-akirado, estas kiel la arbo, kiu falis en arbaro, sed neniu estis apud tiu arbo por vidi, aŭdi kaj memori ĝin. Do, Doktoro Frank kaj liaj verkoj ne estas vidataj, aŭdataj aŭ memorataj ĝuste de la homoj, kiuj povus interesiĝi pri lia laboro: la fakuloj pri dua lingvo-lernado, fremda lingvo-lernado, unuvorte, dua lingvo-akirado.

Profesoro Ellis en sia libro skribas pri plej diversaj temoj, sed ne pri kibernetiko. Li havas ĉapitrojn kaj subĉapitrojn kun rilato al psikologio kaj lingvo-akirado, sociologio kaj lingvo-akirado, antropologio kaj lingvo-akirado, lingvotestado, kulturo kaj lingvo-akirado, motivado kaj fakte DEKOJ da aliaj temoj kaj subtemoj, sed, verŝajne, laŭ tiu eminenta esploristo pri lingvolernado, kibernetiko ne ludas rolon. Tio estas bedaŭrinda por ni esperantistoj, kiuj volus ekkonigi la nocion propedeŭtikon, alivorte, lernfaciligecon de Esperanto al la centoj, eĉ miloj da esploristoj kaj aliaj fakuloj en niaj universitatoj, kiuj okupiĝas pri lingvo-akirado kaj lingvo-lernado. Se fakuloj kaj spertuloj en la profesiaj fakoj, kiuj okupiĝas pri dua lingvo-akirado, ne agnoskas la laboron kaj konkludojn de Frank, malfacile ni povas proponi tiun ideon politike, eduke kaj populare. Niaj bonaj ideoj restas enŝlositaj en verda ĉambro.

Ĉu restas iom da espero por diskonigi la verkojn de Frank al neesperantista mondo? Ĉu estas konkretaj agoj, kiujn ni povas fari? Kiujn paŝojn ni povas fari por ekkonigi kaj disvastigi la pensojn de Profesoro Frank? En la sekvaj alineoj mi provos skizi tri ideojn, tri paŝojn, kiuj eble helpas al ni pli bone komenci montri la Esperantan flankon de la esplorado de Helmar FRANK.

Unu bona paŝo estus komenci fari ligon inter la mondo de Esperanto-instruado kaj la instruado de aliaj lingvoj. Tion ni certgrade nun havas

danke al la laboro de Katalin KOVÁTS kaj de tiuj, kiuj laboras kun la KER-sistemo de lingvotestado. La partopreno de Zsófia KÓRÓDY en la ALTE-konferenco ankaŭ estis bona, ekstera ekpartopreno. Tiaj kunrilatoj kun la profesia mondo estas bonaj ekpaŝoj: ni flegu ilin.

Alia paŝo por diskonigi la verkaron de Frank estus priamenti tion, kio okazas en profesiaj asocioj pri lingvo-instruado. Unu el tiuj asocioj, kun pli ol 20 000 membroj, estas TESOL por la instruistoj de la angla lingvo (*Teachers of English as a Second Language*, Esperante: Instruistoj de la Angla kiel Dua Lingvo, Fremdlingvo). En tiu asocia kadro okazas ĉiutage diskutoj pri la plej diversaj temoj, kiuj rekte rilatas al lingvo-instruado kaj lingvo-lernado. Dum la okdekaj jaroj mi mem estis membro de TESOL kaj ankaŭ de tri aliaj profesiaj asocioj pri lingvo-instruado. Tiutempe mi ofte menciis Esperanton al lingvo-instruistoj kaj lingvo-esploristoj. En tiu medio mi trovis neniun profesiulon, kiu primokis Esperanton. Mi scias, aldone al tiu bona novaĵo, ke probable estas almenaŭ kelkaj esploristoj, kiuj volonte studos temojn rilate al Esperanto. Tamen, ni esperantistoj devas fari la paŝon prezenti nin al ili. Prezenti nin, sed NE kun ia altrudema celo disvastigi Esperanton, sed kun la celo pli bone kompreni la fenomenon „dua lingvo-akirado”. Ni parolu al ili, sed antaŭ ĉio, ni aŭskultu ilin, kaj kune ni ekvidu novajn perspektivojn pri lingvo-lernado.

Tria paŝo, kiu povas helpi ekvidigi la rilaton inter Esperanto kaj lernigfacileco, estus provi daŭrigi la esploro-laboron de Profesoro Frank. Ni faru eksperimentojn pri la lernado de Esperanto, kaj poste provu publikigi la rezultojn de tiuj studoj en NE-Esperantaj revuoj. Mi ne parolas ĉi tie pri la revuo *Language Problems and Language Planning*, kvankam tiu revuo estas tre bona ekzemplo de unu maniero eniri en la mondon ekster Esperantujo. La propedeŭtika valoro de Esperanto estas temo por lingvo-instruistoj, lingvo-testantoj, tio estas, la kontribuoj de Helmar FRANK meritas vidiĝi en la pedagogia kaj didaktika mondo. Mi ne parolas pri teoria lingvistiko. Eĉ Noam CHOMSKY, la eminenta lingvisto kaj filozofo de MIT, ne kredas, ke lia laboro en teoria lingvistiko estas praktike aŭ rekte utiligebla en la mondo de lingvo-instruado.

La laboro de Profesoro Frank estas tre valora por nia lingvo, kaj kvankam liaj esploroj ne pravas (en la fako dua lingvo-akirado ne ekzistas ĝeneralaj pruvoj, ekzistas nur provizoraj teorioj), ke Esperanto havas propedeŭtikan efikon, liaj eksperimentoj faras bonan bazon por posta esplorado, diskutado

kaj konstruado de novaj teorioj. Estas bedaŭrinde, ke spite al la centoj da verkoj de Frank, tiu granda laboro ĝis nun ne tuŝis la profesion mondon de lingvo-instruado, kiel vidiĝas supre en la bibliografio de Doktoro Ellis pri lingvo-akirado. Estas bona momento pensi, kiamaniere la Esperantomovadoj, la instruistoj kaj instruantoj povas fari pli bonan ligon kun profesiaj lingvo-instruistoj kaj lingvo-esploristoj. La laboro de *Esperantic Studies Foundation* estas laŭdinda, sed estus bone vidi pli da provado ekkontakti la profesion mondon de lingvo-INSTRUADO. La subtemo lernfaciliga valoro de lingvo ankoraŭ ne eniris en la diskutotemojn kaj esplorotemojn de la fako lingvo-akirado.

Prezenti la verkojn de Helmar FRANK al la fako SLA (*Second Language Acquisition: Dua-Lingva Akirado*) estus bela paŝo honore al Helmar FRANK. Labori tiel ankaŭ estos bona paŝo por helpi pliprofesiigi nian asocion ILEI. Nia asocio de instruistoj meritas esti profesia asocio, de kiu instruistoj, instruantoj kaj lingvo-esploristoj tra la tuta mondo povas ĉerpi novajn ideojn, kiuj helpas kompreni lingvo-instruadon, kaj kiamaniere oni povas plifaciligi la lernadon de fremdlingvoj. Mi pensas, ke profesoro Helmar FRANK eble konsentus kun ni pri tio, ke tiu tre verda arbo en la mezo de la bunta arbaro vidiĝu kaj aŭdiĝu.

Dennis KEEFE, <keefeinchina@gmail.com>, Ĉinio

Refari la paderbornan eksperimenton...

Mireille GROSJEAN respondas al Dennis KEEFE

Certe indus, endus refari la eksperimenton. Sed kiel? Nepre ni pripensu pri farmaniero, kiu ne estus kontestebla de la ekstermovadaj fakuloj.

Celante tion, ni nepre devus

1. Arigi mil aŭ pli ol mil lernantojn por instrui al ili unue E-on. Sub mil iu eksperimento estas senvalora en statistikaj medioj.
2. Lertigi sufiĉe da instruistoj de E-o por instrui al tiuj klasoj.
3. Arigi mil aŭ pli ol mil lernantojn, kiuj ne ricevos instruadon de E-o (kontrolgrupo). Sen kontrolgrupo iu eksperimento estas senvalora en statistikaj medioj.

4. Arigi dufoje mil aŭ pli ol mil lernantojn de la sama denaska lingvo, kiu povus esti ekzemple la franca. Tiam oni povus arigi klasojn en Belgio, Francio, Svislando, Kanado, Togolando, Benino, Senegalo, ... La kontrolota lernado estu ekzemple la akiro de la angla lingvo.
5. Trovi ekstermovadan instancon, establon, kiu sekvu, analizu kaj taksu la eksperimenton.

Legante tion, ni tuj povas konstati, ke en Paderborn siatempe la nombro de lernantoj estis sub mil kaj la kontrolo instanco estis la kibernetika instituto mem. Nun: ĉu nova tia eksperimento estu ĉefa celo de ILEI ĝuste nun? Kiel meti prioritatojn? Kio plej urĝas por ILEI, por ĝiaj homfortoj, por ĝiaj monrimedoj, por ĝiaj gvidantoj kaj membroj? Jen la demando.

Esperanto por liberigi la parolon



Jam de jaroj, ni scias, ke Esperanto faciligas la lernadon de alia lingvo. Prof. Dr. FRANK el la Kibernetika Instituto de Paderborn (Germanio) kaj Claude PIRON el Svislando brile argumentis, ke se lernado de iu ajn fremda lingvo ebligas elkodigi sian lingvon, Esperanto ebligas rekodigi novan lingvon tute regule, ĉar ne estas esceptoj. Tiel la lernanto troviĝas en la loko de infano, kiu lernas sian gepatran lingvon kaj emas reguligi ĉion. Ni ĉiuj havas pretajn ekzemplojn: lernantoj de la franca diros „*nous faisons, vous faites, ils font*” dum necesas diri „*vous faites*” (verbo „fari”); kolego, kiu instruis E-on al postrestantaj infanoj, kiuj en unu jaro estis lernintaj du lecionojn en la angla, konstatis, ke tiaj lernantoj ne nur lernis (parte) Esperanton pli rapide, sed ankaŭ finfine komprenis, ke „*vous êtes*” (vi estas) apartenas al la sama franca verbo, kiel „*je suis, nous sommes*” (mi estas, ni estas) kaj tiel feliĝis ankaŭ la instruiston de la franca lingvo!

Provleciono al junaj francaj lernantoj (vidu la artikolon de Michel DECHY en IPR 13/3) plezurigas ilin, ĉar ili tuj povas uzi Esperanton. Mi mem faris ĉe 9-jaruloj, kiuj tre rapide ludis kun la verboj (la problemo estis trovi la ĝustan francan konjugacian formon!), ankaŭ kun -ino kaj -ido.

Kiu kapablas el „*sanglier*” (apro) trovi „*laie*” (aprino) kaj „*marcassin*”

(aprido), ne parolante pri „apridino”, kiu ne ekzistas en la franca?

Psike, estas plezuro senti sin kapabla. Mi scias, ke en Francio, du prizorgantinoj en kuraclernejoj por psike malsanaj infanoj faris esplorlaboron pri tio kaj konstatis, ke en E-o la infanoj sentas sin pli liberaj kaj fortaj.

Libere sin esprimi

Denove permesu, ke mi revenu al persona sperto. Dum *Festo de la Placoj* en mia urbeto, haltas junulo ĉe la budo, signas, ke li ne parolas kaj iras hejmen. Li revenas kun kajero kun skribitaj demandoj. Ni sekve supozis, ke li estas surdulo. Tamen, kiam alia demandas, kiel oni diras „*Merci*”, ni respondas „dankon”. Tiam la junulo diras „Kiel en la germana”. Ni konkludas, ke li estas nek surda, nek muta kaj donas al li la kalendareton de JEFO kun deko da simplaj frazoj kaj esprimoj. Post dek minutoj tiu junulo revenas, kaj parolas al mi EN ESPERANTO dum deko da minutoj, nur surbaze de tiu kalendareto kaj klarigas, ke li suferas pri aŭtismo (malsano Asperger) kaj komunikas kun bestoj (li diris „animaloj”) ne kun homoj ... Mi restas senvoĉa!

Ĉiu el ni (escepte de la malmultaj denaskuloj) lernis Esperanton, ĉu dum juneco, ĉu dum emeriteco, kaj konas la malfacilecon alparoli homojn. Sekve kun pacienco kaj bonvolemo, ni pretas aŭskulti kaj kuraĝigi komencantojn.

Mi memoras ŝafiston el Andoj, kiu estis lerninta E-on en sia montaro kaj konis nur la enhavon de la lernolibro, sed li parolis al mi pri sia vivo surbaze de la desegnaĵoj kaj simplaj frazoj de la lernolibro. Tio donas memfidon al la homoj.

Kiam mi instruis en mezlernejo la rusan, mi gvidis ankaŭ Esperanto-kurson. Vizitis ĝin iuj el miaj lernantoj. Unu estis tre timema kaj ne intervenis en la klaso, kion riproĉis miaj kolegoj pri historio aŭ franca lingvo. En decembro, li komencis interveni en la kurso pri rusa lingvo, poste pli kaj pli en la aliaj kursoj kaj la ŝanĝon notis ĉiuj el miaj kolegoj. Esperanto pro sia reguleco kaj facileco ne timigis lin erari (en la franca lern-sistemo, oni ĉefe notas la erarojn, ne la bonajn respondojn), sekve li akiris memfidon kaj kapablon mem interveni por doni respondon aŭ sian opinion. Ĉu mi povas tion konkludi el la okazo, ke mi renkontis lin hazarde en trajno, li dankis min kaj diris, ke li iĝis ...deputito!

Se mi konstatas, ke E-o helpas al pliprofundiga kono de sia gepatra lingvo, ĝi ankaŭ helpas lerni rapide fremdajn lingvojn, kiel ekz. la francan. Lernanto (mi konas polojn aŭ ĉinojn, kiuj lernis la francan en tri monatoj!) jam konas „etapon” en la lernado: la alfabeto estas latinida, multaj radikoj similas. En aliaj lingvoj, verŝajne la problemo estas alia. Ĉu E-o helpas lerni la araban? Ĝis nun, laŭ miaj scioj, neniu studis la temon, eĉ se E-o estas fremda al neniu: ĉiu trovas konatan elementon, kiu ja faciligas parton de la studado. Ekz. arbaro = grupo da arboj. Por francoj, la radikoj estas simpla „arb-”, sed logika ligo ne estas en lia menso inter „arbo” kaj „arbaro”, logiko tute kutima al japanoj, kiuj uzas la samajn tri ideogramojn.

Instruisto, kiu konas plurajn fremdajn lingvojn, povas tuj diri: „Kiel en la rusa” (por granda parto de la gramatiko), „Kiel en la germana” (por kunmetitaj vortoj), „Kiel en la hungara” ktp. Teknike E-o favoras kaj rapidigas la lernadon de aliaj lingvoj. Sed ĝi ankaŭ malfermas la spiriton de la lernanto al la mondo kaj ĝiaj trezoroj: aliaj homoj, aliaj kulturoj, aliaj pensmanieroj. Kaj ĝi donas emon al rektaj kontaktoj.

Renée TRIOLLE, <triolle.renee@wanadoo.fr>, Francio

Kiom internacia estas via vorto? – kompletigoj³



La programo „Kiom internacia estas via vorto? / *How international is your word?*”, kiu estis lanĉita en 2012, ĵus estis adaptita al la apero de ses novaj traduklingvoj en Guglo.

Ili estas ĉiuj aziaj: la cebua, la java, la kmera, la laosa, la maratha kaj la mjaŭa lingvoj.

Kiel konate tiu programo, ĉe www.esp-evoluo.org, helpas doni respondon al la demando, kiel apliki la

15an regulon de la Fundamenta Gramatiko. Ĝi prenas tiun regulon serioza, en kiu Zamenhof uzas la terminon „la plimulto de lingvoj”, kaj donas diversajn eblojn por interpreti la plimulton de la lingvoj statistike.

³ Vi trovas la unuan parton de tiu temo en IPR 2013/1 en paĝoj 12-15.

Unua eblo estas la klasika: Kiuj lingvoj en la tempo de Zamenhof estis la „civilizitaj” lingvoj? Tiam oni atingas liston da sep aŭ ok lingvoj, supozeble du ĝermanaj, du slavaj kaj du aŭ tri latinidaj. Se kvar el tiuj lingvoj enprenis iun ’fremdan vorton’ el sama fonto, la vorto povas senĝene (sed post pripensita adapto al la Esperanta ortografio) esti uzata en Esperanto.

Dua eblo estas konsideri ĉiujn eŭropajn lingvojn, kiuj estas denaske parolataj de minimume tri milionoj da homoj. Ili estas 28 kaj la plimulto do estas 14 (aŭ pli, se vi volas). Ĉar tia egaligo de ĉiuj lingvoj, de la litova al la franca kaj de la hispana al la dana ŝajnas nejusta kaj arbitra, valoras esplori la taŭgecon de tute kontraŭa opcio: pesi la gravecon de ĉiuj lingvoj laŭ ilia nombro de denaskaj parolantoj. Por Eŭropo tio ŝajnas akceptebla ideo, ĉar la eŭropaj mondlingvoj (angla, franca, hispana, portugala) tiam pezas laŭ siaj nombroj da denaskaj parolantoj en Eŭropo kaj la angla okupos dominan pozicion. Kontraŭe, la rusa havas la plej grandan pezon: 116 000 000 kaj poste la germana: 84 432 210. (Nombroj de denaskuloj povas esti eksdataj aŭ ne-precizaj.)

Tria eblo estas la plej radikala: konsideri ĉiujn lingvojn en la mondo kun minimume tri milionoj da denaskaj parolantoj (pluraj kunigitaj en tiel nomata „makrolingvo”, ekz. la ĉina). Ili estas, klasite laŭ kontinento de origino, 90 en Azio, 42 en Afriko, 36 en Eŭropo kaj 5 en Ameriko. Tiuj nombroj estas ankoraŭ nur teoriaj, ĉar la programo por kalkuli la gradon de internacieco dependas de la informoj de Guglo por kontroli, ĉu lingvo enprenis iun fremdan vorton kaj Guglo traktas, krom E-on, nur 65 lingvojn. El tiuj 65 rajtos 57, laŭ la radikala apliko de la 15a regulo, decidi pri la sorto de fremda vorto, ĉar enestas en „Gugl Translejt” ankaŭ eŭropaj lingvoj kun malpli ol 3 000 000 da denaskuloj.

Ĉu la ĉina tiel ne decidus pri la internacieco de multaj vortoj? Ne, ĉar la ĉina estas denaske parolata de proksimume 20% de la tera loĝantaro.

Aliflanke estas vero, ke „eŭropaj” vortoj tie malfacile povas gajni la plimulton, antaŭ ĉio, sen la helpo de parto de la 61% de la homoj, kiuj loĝas en Azio. Al tio estas du rimedoj:

a) malaltigu la limon por akcepto de fremda vorto en Esperanto de 50% al ekz. 40%;

b) pesu la valoron de lingvo ne laŭ la nombro de denaskaj parolantoj, sed laŭ la nombro de potencialaj triagradaj (universitataj kaj altlernejaj)

studentoj. La signifo de potencialoj bezonas tro da spaco por ĉi tie esti eksplikita; mi donis al tiu kvanto la nomon „virtuala akademia valoro”. Por doni ideon de ĝiaj konsekvencoj: la ĉina havas proksimume 1 135 milionojn da ĉinlingvanoj kaj la angla 327 milionojn da anglalingvanoj, sed la v.a.v. de la ĉina estas „nur” 31,0 milionoj, dum tiu de la angla estas 23,4 milionoj.

Kiel kreinto de la programo mi ĝis nun determinis la gradojn (Zamenhofan, eŭropan, tutmondan, kaj la du lastajn laŭ nombro da lingvoj, nombro de denaskuloj kaj v.a.v.) de internacieco pri 238 vortoj, ofte kun mirigaj rezultoj, ekz. ke la vorto arsenalo estas inter la tutmonde plej internaciaj vortoj.

Mi rekomendas al la pacienculoj inter la legantoj elprovi la programon *www.esp-evoluo.org*. Trairi 57 lingvojn por unu vorto kostas al mi maksimume 15 minutojn. Al vi, je la unua fojo, supozeble duonan horon, sed se vi estas sufiĉe cifereca, vi certe ĝuos pri la metodaro kaj la ricevataj informoj. Sukcesa uzado via de la programo estos registrita kaj la rezulto – anonime – sendita al mia stokejo de gradoj de internacieco. Por demandoj kaj komentoj kontaktu johan.derks@gmail.com.

Johan DERKS, <johan.derks@gmail.com>, Serbio

Ŝanĝiĝas la lerneja ritmo en Francio

Kiam en 1865 la ministro Jules FERRY decidis, ke instruado estu ŝtata, senpaga kaj nereligia, la lernantoj parolis regionajn lingvojn sed zorge lernis en la franca, ĉar lernejo estis la „lifto” al pli bona socia kondiĉo kaj profesia promociiĝo. Nun Francio perdis sian unuan lokon kaj estas la lando, kiu plej multe elspezas por instruado sed havas la plej malbonajn rezultojn!

Aldoniĝas la fakto, ke la diversaj ministroj deziras lasi sian nomon al reformo kaj ŝanĝas ion aŭ iom al la tuta strukturo, tiel, ke ne plu estas videbla la ĉefa celo „legi, skribi kaj kalkuli”. Diversaj premgrupoj puŝas al instruado de ekz. latina lingvo, fiziko, filozofio ktp., dependas de la momento. Krome oni ŝovas al la lernejo multon kiel ekzemple edukadon al ekologio, al paco, al trafiko, al homaj rajtoj ktp. Reformo en trejnado de

instruistoj privilegias sciojn kaj ne pedagogion nek malkovradon de problemoj ĉe la infanoj.

Problemoj: Se ni komparas kun Finnlando, kie la infano progresas laŭ sia propra ritmo, la franca sistemo privilegias la tutan grupon. Ĉiuj devas progresi samtempe, do aperas „falintoj”, kaj se tio okazas en la unua klaso, kiam infano ne kapablas lerni kiel legi aŭ skribi, lia tuta instruado estos katastrofa. Elektado okazas pro nekapablo aŭ nefavoro.

Francio admiras Germanion, kie estas kompetentaj manlaboristoj, sed en Francio lernantoj direktitaj al „manlaboraj studoj” estas la malplej bonaj, des pli, ke en la diversaj instruataj fakoj neniu uzas la manojn. Malaperis brodado, trikado, kuirado, ĝardenado, elektroniko, eksperimentoj, lignaĵfarado; sekve infano nenion fabrikas per siaj manoj kaj ne eblas malkovri, kiu ŝatas kaj kapablas.

La socitavoloj liveras hejman edukadon, lingvonivelon, kulturalan kapitalon. Sekve infanoj el malaltaj socitavoloj, kiuj apenaŭ parolas minimuman francan (pli kaj pli da enmigrintoj) aŭ vivas en familio, kie oni ne legas literaturon, ne vizitas muzeojn, ne parolas pri „kulturaj” temoj estas forlasitaj. La „lifto” ne plu funkcias pro „indiferenteco al la diferencoj”. Oftas klasoj kun tro da lernantoj, tiel ke instruisto ne povas havi adaptitan pedagogion por ĉiuj lernantoj, kiuj ne sukcesas, ne progresas, naŭziĝas, forlasas la lernejon. Ĉar se ili ne sukcesas, oni proponas ankoraŭ pli da kursoj!

Konklude: inter 15-jaruloj, unu el kvin jam restis duan jaron en la sama klaso (averaĝe en la mondo 13%) kaj la nombro de nesukcesantaj lernantoj altiĝis de 15% en 2003 al 20% en 2013 .

Ŝanĝo de la ritmo en la unuagrada lernejo

Ankaŭ la nuna ministro, Vincent PEILLON (pr. „vensan pejon”) volas plibonigi la sistemon kaj la rezultojn. Surbaze de statistikoj, li alvenis al la konkludo, ke francaj lernejoj estas inter tiuj, kiuj pli longe studas en la lernejo (tage, semajne). Do por eviti, ke la infano tro longe lernu, ni ŝanĝu la lernejan ritmon. La infano vizitu la lernejon dum 4 tagoj kaj duono (la antaŭa ministro decidis pri kvar tagoj) kaj finos pli frue ĉiutage, laŭ la modelo de Germanio aŭ Sovetunio .

Sed la ritmo de la gepatroj ne kongruas kun la ritmo de la infanoj. Laboras la patro kaj patrino, ne plu apudas avino. Sekve ne eblas liberigi la infanojn je la 3a posttagmeze, sed necesas zorgi pri ili ĝis la 5a. Kaj li faris reformon, kiu ŝovas al la urboj zorgi pri la eksterlerneja programo, proponante ludojn, sportojn, muzikon ktp. fine de la posttagmezo.

Kia rezulto? Multaj urboj, ĉefe urbetoj aŭ vilaĝoj havas nek la monon nek la homojn por dungi „helpantojn”, kiuj instruos ekster la lerneja tempo, sed daŭre en la lernejo, proponante aktivaĵojn. Granda procentaĵo rifuzis enkonduki la ŝanĝon dum 2013-2014 sed nepre devos la venontan jaron. La kaĉo estas tia, ke asociaro faras enketon, ĉu la infanoj pli bone fartas, ĉu ili elturniĝas inter la aktivaĵoj.

Ĉu ŝanco por E-o? Iuj vidis eblon instrui ĝin al lernantoj de la unuagrada lernejo; aliaj kiel mi, rifuzis, ne volante iĝi „gardisto de brutaro” sed pretas se E-o eniras pli larĝan pedagogian projekton pri „edukado al paco”, „enkonduko al interkulturo”, „lanĉilo al lingvo-instruado”.

Renée TRIOLLE, <triolle.renne@wanadoo.fr>, Francio

Regula lerneja agado inter Herzberg kaj Góra

Resumo okaze de la 20-jara ĝemelurba jubileo

El nenio io, eĉ io grava kaj bona. Jen mallonga sed tre esprimriĉa frazeto, kiu bone montras la pasinton kaj la nunan staton de E-uzado por ĝemelurbaj kontaktoj inter Herzberg am Harz en Germanio kaj Góra en Pollando.

Pasinto: la du urboj, Herzberg kaj Góra oficiale ĝemeliĝis en oktobro 1993. Tempo pasis, la rilatoj malfortiĝis, la iamaj iniciatintoj maljuniĝis. Inter ili estis kelkaj esperantistoj, sed ili aŭ forpasis aŭ perdis kontaktojn unu kun la aliaj. Nur en 2005 post interkonsento de la du urbestroj kaj aktiviĝo de Interkultura Centro Herzberg (ICH) komenciĝis nova etapo, en kiu gravan rolon ludis kaj ludas instruistoj kaj lernantoj.

Ekago: la unuajn instruistojn por Góra lingve kaj metodike trejnigis Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, fakuloj de ICH, kaj poste instigadis la koleginojn ekagi en lernejoj proponante E-kurson en baz- kaj mezgradaj lernejoj.

Oficialaj vizitoj de ICH-aktivuloj al la lernejoj kaj al la urbodomo en Góra fortigis la lokan E-agadon. El tiu kunagado naskiĝis la E-klubo en la pola urbeto kaj ankaŭ la regule okazantaj Someraj Arbaraj Lernejoj (SALO). Ili estas ĉiujare organizataj aŭ en Herzberg aŭ en Góra kaj multe kontribuas al ekkono unu de la alia, al plibonigo de lingvaj kapabloj kaj al fortigo de amikaj rilatoj.

SALO: Somera Arbara Lernejo estas kunferiumado de 12- ĝis 18-jaraj polaj kaj germanaj lernejanoj en somero, kiuj dum la tutsemajna programo intense lernas E-on sub gvido de spertaj E-instruistoj, kursgvidantoj kaj helpantoj. Pri la organizado zorgas ICH aŭ la E-klubo en Góra kun helpo de ambaŭ urboj kaj parta subvencio de German-Pola Junulara Fondaĵo. Dank' al la konstanta strebado kaj subvencipetado inter 2006-2013 ĉiujare ni sukcesis organizi tiun ĉi gravan renkonton por la ĝemelurba junularo. El inter la ĝisnunaj 8 kunvenoj 6 okazis en Germanio kaj 2 en Pollando. SALO 8 en 2013 estis tre speciala, ĉar ĝi okazis samloke kaj samtempe kun la 46a ILEI-konferenco kaj per tio ni povis ebligi interagadon de instruistoj kaj gelernantoj dum kelkaj fakaj kaj kulturaj eventoj.



La pedagogia programo: ĉiutage antaŭtagmeze okazas 5 Esperanto-lecioj, do dum la semajno ĉ. 20-25. En la unuaj jaroj ni instruis la 16-20-membrajn grupojn kune, poste ni apartigis la pli bone parolantojn dum kelkaj lecionoj, sed ĉiam zorgis pri tio, ke restu sufiĉaj komunaj aktivecoj, ke la diferencigo ne kaŭzu apartiĝon, ke la progresintoj helpu la komencintojn kaj restu sufiĉaj komunaj dumlecionaj travivaĵoj. Alia grava afero estas harmoniigi la kunlaboron inter diversnaciaj, diverskulturaj lernantoj kaj atingi, ke ili ne havu malavantaĝojn pro nekono de fremda lingvo, ke ili bone kunlernu en miksitaĵaj grupoj kaj havu toleremon, paciencon, se iu pli malrapide komprenas ion aŭ ne kapablas solvi iun taskon. Tre gravas ankaŭ, ke la lernantoj lernu ankaŭ unu de la aliaj, pri la landoj, urboj, diversaj kutimoj, ekhavu kulturajn konojn. Dumtage plurajn taskojn, hejmlaborojn, ordigadon, purigadon, preparon de matenmanĝo kaj vespermanĝo ili devas plenumi mem, laŭ deĵorsistemo, laŭeble miksite, egale, ĉu knaboj, knabinoj, poŝtoj, germanoj. La celo estas kompreneble instigi al kunlaboro, amikiĝo, komunikado dum farado.

La instruado: la uzataj instrumentoj estas tre variaj, depende de la stilo, sperto kaj personeco de la instruantoj. Gravus, ke la lecionoj ne estu similaj al lernejoj, ja junuloj en somero ŝatas havi pli amuzan kaj pli liberstilan lernadon ol ili havas en sia lernejo. Pro tio ni devas uzi bildojn, didaktikajn ludojn, interesajn lernmaterialojn, muzikon, kantojn, aktivigajn ekzercojn, konkursojn, ŝercojn ktp. La instruado ne limiĝas al la 5 antaŭtagmezaj lecionoj, E-o estas uzata tuttage, dum komuna manĝado, dum babilado pri hobiaĵoj, amikoj, ferioj kaj lernejo, dum posttagmezaj kaj vesperaj programoj. Ĉiam ni pensas ankaŭ pri tio, ke dum la lecionoj estu tempo por komune verki ion, pretigi desegnaĵojn, bildojn, manlaboron ktp., ion, al kio preskaŭ ĉiuj povas kontribui sendepende de lingvaj kapabloj, sendepende de la nacia lingvo, lerteco, talento. Dum tiuj komunaj aktivitaĵoj ili devas ekuzi E-on por praktika komunikado kaj ili tuj havas celon, temojn, pri kiuj paroli unu kun la aliaj.

Aliaj programoj: dum la posttagmezoj kaj vesperoj okazas variaj programproponoj por la partoprenantoj. Kelkaj aktivitaĵoj estas sub la gvido de la instruantoj, helpantoj, aliaj estas en la resto de la libera tempo. Ili povas – ĉu individue, ĉu en grupetoj - sportadi, ludi en la klasĉambroj aŭ ekstere, fari plej diversajn manlaborojn, kartludi, rolludojn plenumi, kanti, danci, legi, promeni, ekskursi en la ĉirkaŭaĵo. Dumsemajne enestas ankaŭ 1-2 pli longaj ekskursoj per buso al iu fama loko, urbo, kie la lernantoj

povas viziti muzeon aŭ aliajn vidindaĵojn. La posttagmeza programo enhavas nur unu devigan taskon: ili devas verki taglibron, priskribi en la germana, pola aŭ/kaj en E-o, kion ili faris, lernis, kiel ili fartis, kio okazis dumtage. Tion ni ĉiujare kolektas kaj pretigas etan albumon. Ĉiam ni petas, ke ili ankaŭ aldonu desegnaĵojn, ja ofte per kelkaj belaj bildoj ili pli multon diras, povas pli bone esprimi la travivaĵojn, ol per vortoj. Tiuj bildoj estas ankaŭ belaj memoraĵoj pri la semajno kaj eblas ankaŭ ekspozicii ilin ekzemple en lernejoj, en inform-vitrinoj ktp. La vesperoj estas aparte gravaj, ĉar tiam estas denove tempo por komunaj aktivaĵoj, lernado per amuziĝo, per filmoj, kantado, prezentado de propra talento dum la t.n. internacia vespero.

Rezulto: post ĉiu jaro ni povis konstati, ke nia strebado atingas sian celon. La lernantoj bonfartas, ekŝatas kaj ekuzas E-on, multe ŝercas, ridas, ludas, amuziĝas kune kaj pli kaj pli amikiĝas unu kun la aliaj. Antaŭjuĝoj malaperadas, la komunaj travivaĵoj kreas bonan bazon por daŭra amikeco. Pluraj lernantoj re- kaj revenadas, jam senpacience atendas la sekvontjaran kunferiumadon. La plej kortuŝaj momentoj por ni, instruistoj, helpantoj, organizantoj estas vidi la larmon en la okuloj, dum ili ĉirkaŭbrakumas unu la alian adiaŭante ĝis la sekva renkontiĝo.

Estas unika tia kunlaboro inter ĝemelurboj, inter gelernantoj, estas nepre daŭrigenda, ripetenda projekto, eĉ se la serĉado de subvencio, organizado, instruado, dokumentado, raportado ktp. estas temporaba kaj postulas volontulan laboron de ni, plenumantoj de la programo. Detalojn, kelkajn raportojn vi povas trovi sur la hejmpaĝoj de urbo Góra, Herzberg kaj per <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=24949415>

Zsófia KÓRÓDY, <zsofia.korody@esperanto.de>, Germanio

Kune komunume laŭ la spuroj de Zamenhof

Inter la **5-a kaj 14-a de aŭgusto 2013** okazis en la pola banloko **Szczawno Zdrój** la jam **46-a Internacia E-Feriado**. La antaŭtagmezoj plenis je instruado, la posttagmezoj je ekskursado kaj la vesperojn ornamis komuna ĉeestado. Kurson por **komencantoj** surbaze de la lernolibro de Stano MARČEK „Esperanto per rekta metodo” gvidis Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi), **progresigan kurson** „Lernado per aŭskultado” surbaze de sonlibro

„Bona Espero – idealo kaj realo” gvidis Roman DOBRZYŃSKI, **konversacia rondo** laboris sub gvido de Teresa NEMERE, kaj Bogdan DEMBIEC kune kun la ĉeforganizantino de la aranĝo Teresa POMORSKA en **meznivela kurseto** paroligis la interesulojn.



La marda **traurba piedpromeno** montris al ni la lokajn zamenhofaĵojn: la vilaon František, en kiu Zamenhof trapasis sian plej longan, sepsemajnan libertempon. Dum ĝi li venis al la konkludo, kiun li prezentis en la posta krakova kongreso, nome, ke li en sekvaj kongresoj ne plu staros antaŭ la samideanaro, sed inter ili. Sur la domo oni pasintjare senvualigis rememorigan tabulon.

Tuj proksime en la parko troviĝas E-ŝtono kaj sur la muro de kuracdomo inter aliaj famaj vizitantoj de la banloko aperas pollingve nomo de aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto. Posttagmezon kronis en la kuracdomo belega **koncerto** de Wojtek Ławnikowicz, kiu akompanis sin per gitaro.

Jen la plua kantanta talento en Esperantujo, simile blinda kaj simile belvoĉa kiel la germano Kaŝi, raviginta sian aŭskultantaron dum la ĉi-jara SES.

Unu el sekvaj **ekskursoj** gvidis al proksima alia banloko Jedlina-Zdrój, perpiedaj **promenoj** gvidis al la kastelo Książ laŭ la ravino de Pełcznica, aŭ al la monto Kozi Wierch. La **tuttaga ekskurso** montris al la partoprenantoj la belecon de la ĉeĥa sabla ŝtonaro ADRŝPAĤ.

Dum la **vespero** ni mardon spertis interesajn sociajn ludojn sub la gvidado de Wanda KICMAN, kaj komuna kantado fermis la interesan kunestadon. Merkrede Roman DOBRZYŃSKI, ĵurnalisto kaj mondvojaĝanto, aŭtoro de la plej nova libro pri Oomoto, prezentis al ni filmon pri tiu fama japana religia grupo. La japano Teruo Matsumoto, vivanta jam multjare en Pollando, prelegis pri Japanio, la hungaro István KABÓK pri historiaj eventoj dum la aŭstro-hungara epoko, Stanislaw MANDRAK pri la brazila ĉefurbo kaj la lokaj edziĝkutimoj, kiujn li povis persone sperti dank' al sia juna brazila amiko.

Ni ne forgesu la **poezian renkontiĝon** kun Halina KUROPATNICKA-SALAMON omaĝe al la fama poeto Tuwim en ĉarmega loka kafejeto.

Ne mankis ankaŭ komuna kantvespero kaj en la adiaŭa dancvespero en urba kafejo ĉiuj vikle partoprenis.

Dum sabato kaj dimanĉo, nomitaj **Scienca Semajnfino**, laŭ la aparta plano sekvis prelegoj diverstemaj. Mi plej interesiĝis pri la prelego *Marĝenaj eroj de Esperanto*, kie Kostik proksimigis al ni neologismojn, slangon kaj fivortojn en Esperanto... kaj la perprelega konatiĝo kun kata kaj hunda parolmanieroj ankaŭ estis ege interesa! La vespera kvizo kontrolis, ĉu la aŭskultantoj sekvis atente la prelegojn, aŭ tradormis ilin...

La aranĝon per sia retpoŝta mesaĝo salutis ankaŭ la freŝelektita ILEI-prezidantino Mirejo GROSJEAN. Ŝi skribis:

Karaj gestudentoj! Vi decidis lerni Esperanton, vi deziras progresi, vi dediĉas tempon por plilertiĝi. Mi gratulas vin kaj kuraĝigas vin uzi la lingvon, vi havos mirindajn kontaktojn kun la tuta mondo. Kuraĝe antaŭen! Elkore salutas Mireille Grosjean, Svislando, prezidanto de ILEI.

Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi), <ilei.oficejo@googlemail.com>, Slovakio

Semajnoj de Esperanta Perfektigo (SEP)

Koncentrita studado, modula sistemo:

Por helpi tiujn, kiuj ŝatus dum mallonga periodo intense studi kun surloka faka helpo de specialistoj kaj partopreni en t.n. modula trejnsistemo, ILEI proponas novan klerigvojon. Laŭ difinita plano la diversaj subfakoj en formo de moduloj estas plenumebaj ne nur en sinsekvo sed en fleksebla varieco. La modula instruista trejnado (MITE) estas sistemo por kapabligi novajn instru- kaj organizpretajn movadajn fakulojn.

Interkultura Centro Herzberg (ICH)/Germana Esperanto-Centro (GEC), la klerigejo de Germana Esperanto-Asocio (GEA) en Herzberg am Harz regule zorgas pri modula klerigado kaj atingas per ĝi bonajn rezultojn ekde pluraj jaroj.

Celpubliko de la instruista kapabligado:

Principe tiu trejnado estas por ĉiuj, ne gravas la aĝo, nek la antaŭaj studoj aŭ posedo de universitata diplomo.

Povas aliĝi lernemuloj, perfektigemuloj proksime al B2-C1 niveloj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro; lernantoj, lernintoj per Lernu!-materialoj aŭ/kaj per Flugiloj-seminarioj; interesiĝantoj pri gramatiko, lingvistiko, historio kaj nuntempo de la E-movado, instruemuloj, kiuj volas ne nur teorion pri pedagogio, metodiko, sed ŝatus akiri instrukapablojn en la praktiko, ricevi gvidadon de spertaj movadaj fakuloj, instruantoj, instruistoj; aspirantoj por instruarjiga diplomo de ILEI.

Strukturo:

Eblas partopreni unu aŭ du semajnojn aŭ eĉ nur kelkajn tagojn. En la somera dusemajna periodo enestas 125 lecionoj kun la sekva strukturo: 5x45 minutoj antaŭtagmeze (kun paŭzoj), 4x45 minutoj posttagmeze kaj 2-3 liberaj ekzerc-horoj, kromaj aktivajoj vespere. La tuttaga kunestado, kunlaborado de la partoprenantoj certigas bonan laborritmon kaj la eblon detale trakti ĉiujn temojn, havi tempon por diskutado. Granda helpo por la intensa lernado estas ankaŭ la loko: la trejnsesioj okazas en la biblioteko de ICH, kie eblas tuj studi, konsulti faklibrojn, vortarojn, lern- kaj instru-materialojn, pedagogiajn verkojn ktp. Tiel la konsultado de fakliteraturo povas okazi surloke paralele kun la trejnsesioj.

Fakoj, temoj:

1. lingva perfektigo, plilarĝigo de vortprovizo, praktika helpado laŭ individuaj bezonoj, diskutado pri specifaĵoj de Esperanto-gramatiko, stilo, neologismoj, fakvortaroj, tradukado ktp.
 2. literaturo, la verkaro de Zamenhof, lernado pri famaj verkistoj, aŭtoroj de la konataj literaturaj periodoj, skoloj, la rolo de bibliotekoj, informoj pri rete akireblaj literaturaj verkoj, rekomendlisto de legendaĵoj, legindaĵoj.
 3. metodiko en la praktiko: konatiĝo kun diversaj instrumetodoj, prezentado de didaktikaj ludoj, diskutado pri personaj instruspertoj, analizado, komparado de lernolibroj kaj aliaj lernmaterialoj.
 4. movadaj konoj kaj E-historio: prelegoj kaj prezentadoj pri E-organizaĵoj, gravaj movadaj eventoj (kongresoj, konferencoj), pri eldonaĵoj, gazetoj, informiloj ktp., informado, varbado, gazetara laboro, organizaj taskoj.
- La intereso de ILEI ja estas ne nur rajtigi instrukapablulojn sed klerigi fakulojn, kiuj mem estos varbantoj, disvastigantoj de nia lingvo kaj fariĝos fake spertaj gvidantoj por nova generacio de lingvouzantoj.

Studperiodo en 2014: 19 julio – 03 aŭgusto. Aliĝu ĉe *esperanto-zentrum@web.de*. Limdato por peti stipendion: 20 aprilo 2014.

Zsófia KÓRÓDY

Kalendaro

12-20.07.2014

SES – Somera Esperanto-Studado, Nitra, Slovakio

<http://ses.ikso.net/2014/sk/>

17-25.07.2014

SES – Somera Esperanto-Studado Moskvo, Rusio

<http://kaest.ikso.net/pmwiki/pmwiki.php?n=Main.Enkonduko>

19-25.07.2014

47-a ILEI-Konferenco, Montevideo, Urugvajo [vd p. 38]

<http://ilei.info/>

19.07-03.08.2014

SEP – Semajnoj de Esperanta Perfektigo, Herzberg, Germanio [vd p. 30]

27.07-02.08.2014

UK – Universala Kongreso de Esperanto, Bonaero, Argentino

07-10.10.2014

4a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA), Oomoto-Centro en la urbo Kameoka, Kioto, Japanio.

Kapabligo de instruistoj/gvidantoj por bona gvidado

09-12.10.2014

3a IEL – Internacia Esperanto-Lernejo, Bartoŝovice, Ĉeĥio

13-16.11.2014

KAEST – Konferenco Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko, Modra, Slovakio. Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon, <http://kaest.ikso.net/pmwiki/pmwiki.php?n=Main.Enkonduko>

Nova slogano por ILEI

Vi lernas. ILEI helpas.

Por helpi, ILEI bezonas rimedojn. Pro tio mi alvokas hodiaŭ al vi por helpi al membrigo de kolegoj en malfacilaj vivkondiĉoj. De jardekoj ILEI havas „**Koleg-helpan Kason**” (KhK). Ĝi utilas al membrigo de kolegoj en diversaj mondopartoj, kiuj penas trovi la manieron pagi la kotizon.

Do bonvolu pripensi: se via financa situacio ebligas tion, bonvole donacu monon al ILEI por tiu tre valora kaso. Ĝirado de mono povas okazi per la UEA-konto de ILEI: *ilek-a*. Bonvolu aldoni precizan indikon pri la uzo de via donaco: por Koleg-helpa Kaso. Ĉiuj membroj de ILEI dankas vin.

Helpo al ILEI povas esti per simpla membriĝo. Se vi legas la statuton de ILEI, membro ne nepre estas instruisto, ne nepre instruas Esperanton. Iu povas sekvi niajn klopodojn kaj subteni la Ligon per membriĝo kaj pago de kotizo. Nun ni havas kontaktojn en 60 landoj, tio estas bela kresko. Ni plu kresku!!

Mireille GROSJEAN, prez de ILEI

Nova jaro, nova motivigo

Karaj membroj, karaj legantoj,

Mia jarkomenco okazis en Kotonuo, Benino, kadre de la kvina Afrika Kongreso de Esperanto. Kun gesamideanoj el 11 landoj mi povis ekscii pri la stato de Esperanto en diversaj landoj. Tre stimula situacio, tre valoraj interŝanĝoj, tre fruktodona reciproka informado. Ĉiuj partoprenantoj forlasis Kotonuon kun renovigita plifortikigita motivigo al aktivado; ili akiris novajn agadideojn, kolektis novajn kontaktojn, sentis sin ano de tutmonda familio helpema kaj kunsenta.

Nova motivigo: tion mi deziras al vi ĉiuj! Ni ĉiuj agu adekvate kaj trafe por informi pri Esperanto, por lerte instrui nian lingvon, por mem diligente progresi en ĝia uzo. Bv raporti pri viaj aktivaĵoj, tiel bonaj ideoj atingos aliajn kolegojn tra la mondo. Nia revuo IPR utilas al tio.



Via prezidanto, Mireille GROSJEAN

Francio

PRINTEMPaS en Greziljono (<http://gresillon.org/printempas>)

La Kulturdomo Greziljono organizas kunlabore kun ILEI kursojn por personoj kiuj lernis Esperanon kaj deziras progresi kaj trapasi KER-ekzamenojn. La kursoj okazos inter la 27-a de aprilo kaj 2-a de majo 2014, kaj la ekzamenoj la 3-an kaj 4-an de majo.

La kurson por komencantoj kaj komencintoj, kiu celas progreson de la nivelo A1 al A2, gvidos Jean-Luc KRISTOS. De la nivelo A2 al B1 gvidos Christophe CHAZAREIN per sia kurso „Bonvenon en nia vilaĝo!” Li planis kaj gvidos la kurson kiel grandan ludan aventuron en kiu la kursanoj kunkreas vilaĝon, vivigos ĝiajn loĝantojn per diversaj roloj (vilaĝestro, leterportisto, ĝendarmo, instruisto, bakisto) kaj rakontos ĝiajn historiojn. Tio ebligos tuŝi grandan diverson de kampoj de la ĉiutaga komunikado, celante pretigi la kursanojn al la temoj de la B1-nivela ekzameno kaj ekzerci skribe kaj parole la diversajn kompetentojn tiunivelajn.

La antikvaj romanoj proverbis „*Per aspera ad astra*” celante malfacilan, dornoplenan vojon al gloraj altoj de sukceso. Ankaŭ la lernado estas malfacila laboro survoje al scio kaj kompetento, tamen la vojo al C-nivelaj altoj de lingva kompetento en Esperanto ne devas esti dornoplena kiel en la latina proverbo.

La kurso „*Per perloj al astroj*” de Radojica PETROVIĆ proponas pli agrablan kaj ĝuan vojon tra Esperantaj literaturo kaj muziko. Elektitaj perloj de Esperanta kulturo – poemo, novelo, kanto, filmeto, gazeta raporto, faka artikolo – estos la baza materialo per kiu la kursanoj konatiĝos kun kulturaj valoroj de E-o kaj samtempe progresigos siajn lingvajn konojn kaj komunikajn kapablojn ekde la nivelo B1 al B2 kaj C1 tra leksika, gramatika kaj enhava analizo de la verkoj, lingvaj kaj interkulturaj ludoj, debato pri elektitaj temoj kaj verkado de eseoj. Abundo da interkulturaj temoj kaj situacioj en Esperantaj verkoj kaj en propraj spertoj de la kursanoj estos motivoj por ankaŭ pridiskuti, testi kaj kreskigi sian interkulturan komunikkompetenton.

Pri kompleta printempa programo kaj postaj planoj de la Kulturdomo Greziljono bonvolu legi ĉe gresillon.org/agendo. Adreso: MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, Francio. Tel: 02.41.89.10.34, kastelo@gresillon.org. Retejo: gresillon.org.

Radojica PETROVIĆ

Nederlando

Cseh-Seminario en Hago

La estraro de Internacia Esperanto-Instituto decidis denove organizi Cseh-seminaron. Tio estas kurso destinita por personoj, kiuj volas mem instrui laŭ la Cseh-metodo au nur konatiĝi kun ĝi. La partoprenantoj devas bone regi E-on, ĉar la seminario ne taŭgas por lingvo-komencantoj. Ankaŭ estoj ekster Nederlando estas bonvenaj. Jam anoncis sin samideanoj el Germanio kaj Polio. La instruistino estos Katalin KOVÁTS, tre sperta Cseh-instruistino, kiu dum pluraj jaroj gvidis en diversaj landoj Cseh-kursojn. La seminario okazos en Riouwstraat 172, la oficejo de IEI, dum 3 tagoj: je la 14-a, 15-a kaj 16-a de marto 2014. Lecionoj estos matene dum 2 horoj kaj posttagmeze dum 2 horoj. La lernantoj povos dum 3 tagoj komune lunĉi en itala restoracio. Ĉiu devas mem prizorgi sian eventualan tranoktadon. Aliĝkosto nur por la kurso estas 35 eŭroj, pagendaj al IEI konto ĉe UEA: *iein-q* kun mencio „seminario” aŭ al nia konto *162626 Internationaal Esperanto-Instituto, Den Haag*. Pliajn informojn donos la organizanto Ed BORSBOOM: tel 030-2202673 aŭ ed.borsboom@versatel.nl.

Pollando


Poznano atendas vin

En la Universitato Adam Mickiewicz startos en septembro la trijaraj studoj pri interlingvistiko. Personoj kun baza universitata diplomo rajtas partopreni. Bonvolu pripensi aliĝon.

Jen kelkaj argumentoj:

Bela urbo.

Agrabla hotelo. Bongustaj manĝoj.



Amikecaj rilatoj kun gestudentoj.

Interesaj prelegoj de elstaraj fakuloj el la tuta mondo. Ŝvitigaj ekzamenoj, kaj poste ŝtate agnoskita DIPLOMO!!

Jen kelkaj impresoj de la urbo:

<http://mirejo3.blogspot.ch/2013/10/poznan-uam.html>

Jen tri nunaj studentoj pretas respondi viajn demandojn pri tiu studado:

Anina STECAY (Germanio, aninastecay@gmx.de),

Ivan COLLINS (Brazilo, iecolling@yahoo.com.br),

Pawel FISCHER-KOTOWSKI (Pollando, fiskot@gmail.com).

Serbio

Unu fino kaj unu komenco, kaj daŭro

En decembro finiĝis trimonata komenca E-kurso en Bor (orienta Serbio), organizita de la Fervojiŝta Esperanto-Societo el Niŝ kaj Popola Biblioteko de Bor, kiun gvidis d-ro Goran GOLUBOVIĆ, profesoro de la Filozofia Fakultato de la Universitato de Niŝ. En Beogrado komenciĝis progresiga kurso per E-kulturo titolita „*Per perloj al astroj*” gvidata de Radojica PETROVIĆ, sekciestro de ILEI-RS. Plu daŭras komenca E-kurso de Tereza KAPISTA en la beograda societo „*Nova sento*”, kaj en aliaj societoj en Beogrado, Jagodina, Senta, Subotica, Niŝ, Zaječar, Leskovac daŭras ilia laŭplana aktiveco.

La kurso en Bor finiĝis per A-ekzameno laŭ la trinivela ekzamenprogramo de Esperanto-Instituto de Serbia Esperanto-Ligo. ILEI donacis al la sukcesintoj kaj kursgvidinto ekzemplerojn de *Juna Amiko*, *IPR* kaj *Kontakto*. D-ro Golubović nun planas proponi E-kursojn en filologiaj fakoj de la Filozofia Fakultato en kiu li profesoras. La direktorino de la biblioteko dum la fina ceremonio esprimis sian entuziasmon ĉar la biblioteko ricevis ankoraŭ unu sukcesan agaderon – la E-kurson – en sia kultura programo. Ekestis ideo fondi en la biblioteko E-fakon el librodonacoj jam promesitaj de beogradaj kaj aliaj esperantistoj.

Anstataŭ „*Per aspera ad astra*”, kiel asertas la latina proverbo – ke la vojo al sukceso estas malfacila, dornoplena –, la kurso „*Per perloj al astroj*” elektas pli agrablan kaj motivigan lernmetodon per perloj de E-kulturo – Esperantaj versaĵoj, prozaĵoj, muzikaĵoj. Krom ĉeestaj lecionoj en la

societejo, la kursanoj kaj kursgvidanto komunikiĝas rete per la retgrupo *per-perloj-al-astroj@googlegrups.com*.

Ĉiuj estas bonvenaj aliĝi – progresemluloj por progresi, progresintoj por helpi la progresantojn – eĉ se iu el alia urbo ne povos veni al ĉeestaj lecionoj en Beogrado. Samtitola kurso kun similaj enhavo kaj metodoj okazos en la kastelo Greziljono, Francio, 27 aprilo – 2 majo 2014 (<http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=eo>). [vd p. 34].

Radojica PETROVIĆ

Svislando

Komuna Seminario de SIS en la lernejo „La Granda Ursino”

Okaze de sia parolado dum la malfermo de la UK en Rejkjaviko, la nova prezidantino de ILEI Mireille Grosjean emfazis la valoron de internaciaj renkontiĝoj en proksimeco, tio estas kun najbaraj landoj. Konsekvence kiel prezidanto de Svisa ILEI-Sekcio (SIS) ŝi devis ekagi.

La 26an kaj 27an de oktobro 2013 okazis Komuna Seminario de SIS en la lernejo „La Granda Ursino” en La Chaux-de-Fonds, Svislando. Dudeko da personoj partoprenis, inter aliaj unu persono el norda Francio, unu el Parizo, du el Liono kaj du el Grenoblo, do 6 francoj venis al Svislando.

Sabate okazis unue laŭstatuta Ĝenerala Asembleo de la Sekcio, poste prelego pri la pedagogio de C. Freinet, uzata en la privata lernejo „La Granda Ursino”; prezentis tiun parton Anke Brouwer kaj Mónica MOLNÁR, respondeculinoj de tiu establo. Mireille GROSJEAN prezentis diversajn aspektojn de la lernhelpa efiko de Esperanto. Marion BÉLISLE prezentis la fenomenon de alte dotitaj infanoj kaj la diversajn aspektojn de ilia lernado, evoluo kaj ensociiĝado. Komuna vespermanĝo okazis kaj ebligis konatiĝon kaj kontaktojn.

Dimanĉe dekpersona grupo povis viziti la Centron pri Esploro kaj Dokumentado pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la urba biblioteko sub la gvido de Claude GACOND, arkivisto de ĝi. Post komuna tagmanĝo dekpersona grupo iris viziti la belegan internacian horloĝmuzeon de La Chaux-de-Fonds. Do du plenaj tagoj ĝojigis la partoprenantojn.

Mireille GROSJEAN, prez de SIS

Kial en Montevideo(n)?

Ĉar:

- En Montevideo antaŭ 60 jaroj Unesko akceptis la unuan rezolucion pri Esperanto. Ni iros en Montevideon ĉi-jare por celebri la datrevenon. Kaj ne nur por celebri, sed ankaŭ por plani plian utiligon de la uneska fono por disvastigado de Esperanto subtene al lingva justeco.
- Du urugvajaj ministerioj, Unesko-komisiono kaj la Universitato rekonis la kulturalan gravecon de la konferenco de ILEI kaj morale subtenas ĝin. Ni iras tien por dialogi kun ili pri niaj komunaj streboj sur la kampo de kultura kaj lingva ekologio.
- Niaj fervoraj gesamideanoj en Montevideo bezonas kaj scipovos utiligi nian subtenon por plifortigi la landan E-movadon. Ni konferencos en Montevideo por kuraĝigi ilin.
- Nia antaŭa latinamerika konferenco en Matanzas, 2010, kaj ĝia pedagogia seminario lasis en tiu mondoparto profundajn spurojn de ILEI. Ni seminarioj ankaŭ en Montevideo, pluflege kaj pluinstitute.
- En Urugvajo renkontiĝas eŭropa kaj afrika influoj sur la sudamerika grundo kreante specifan socian etoson kaj kulturalan riĉaĵon. Konferencaj ekskursoj vizitigos nin al kelkaj el la plej interesaj vidindaĵoj.
- Kun konferencejo en la urbocentro, en la fama *Ateneo* aĝa jaron pli ol Esperanto, la konferencanoj havos en promendistanco elekteblon de moderne ekipitaj kaj moderprezaj hoteloj, hosteloj kaj restoracioj. Ni iros tien por frandi urugvajajn manĝojn, ĝui urugvajan muzikon kaj lerni urugvajajn dancojn.
- Organizota transiro el Montevideo al la transgolfe proksima Bonaero eblas per busveturo, ŝipe aŭ fluge. Ni konferencos en Montevideo por kontribui al la tujposta UK per konferencaj konkludoj kaj agadinstigoj.

Venu en Montevideon por ĝui la tradician amikan etoson de ILEI-konferenco kaj ĝuindaĵojn de Urugvajo. Konferencu kun ILEI por progresigi la E-movadon en Urugvajo kaj Latinameriko. Proponu viajn kontribuojn por: interkona frandvespero, internacia vespero, lingva foiro, kleriga programo, simpozio. La aliĝilon, troveblan en la retejo *ilei.info* kaj en la pasinta numero de IPR, sendu al *ilei.kasisto@gmail.com*. Viajn kontribuopropojn sendu al la estrarano pri konferencoj (la adreso ĉi-sube).

R. Petroviĉ, estrarano pri konferencoj <radojica.petrovic.rs@gmail.com>

Simpozio de ILEI, Montevideo, 24/25 julio 2014

Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj kaj tendencoj

Subtemoj

- Lingva ekologio mondscale kaj en Latinameriko
- Lingva justeco kaj dulingva interkultura edukado
- Dulingvismaj tendencoj kaj oficiala lingvopolitiko en Urugvajo
- Lingva justeco rilate al la strategio „Edukado por ĉiuj” de Unesko
- Potencialoj kaj kontribuoj de Esperanto

Partopreno

- Ĉiuj konferencanoj rajtas partopreni en la simpozio sen aldona kotizo
- Ceteraj interesatoj povas aliĝi per la konferenca aliĝilo kun indiko „nur simpozio”. La nursimpozia kotizo estas 30 EUR.

Prelegoj

Siajn proponojn por maksimume 30-minuta prelego, kun preleĝtitolo kaj maksimume 200-vorta resumo, bonvolu sendi al la estrarano pri konferencoj (retadreso ĉi-sube) plej laste ĝis la 15-a de junio 2014. Ĝustatempe alvenintaj resumoj estos publikigitaj en la Konferenca libro. Plenaj tekstoj de prezentitaj prelegoj estos proponitaj por publikigo en IPR aŭ alia revuo.

R. Petrović, estrarano pri konferencoj <radojica.petrovic.rs@gmail.com>

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónica Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leysteer Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekō Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrola: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernandez, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi. Estrare: Penny Vos.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Bharat Ghimire, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”..

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnseĵoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.
Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

UN: komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leyeester Miro**.

UNESKO (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Vilĵo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. [<ilei.kasisto@gmail.com>](mailto:ilei.kasisto@gmail.com).

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto aŭ al la ILEI-konto ĉe UEA:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*).

* Simpla abono de IPR sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <moerbeek@gmail.com>.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 4-an de februaro 2014, redaktfino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2014.

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI, Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3, AL-1016 Tirana, bselimi@gmail.com

Aŭstralio: Jennifer BISHOP, 24/8 Wallen Rd, Hawthorn, AU-3122 Victoria, bishop.jennifer699@gmail.com

Belgio: Marc CUFFEZ, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, flandrio@hotmail.be

Benino: ALOFA Jérôme Charles, 04BP0672 BJ Cotonou, Rép. du Bénin, alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Leyeester MIRÓ, rua Jorge Tiburcia 592, Vila Mariana, BR-041-26001 Sao Paulo (SP), leyester@gmail.com

Burundo: Jérémie SABIYUMVA, BP 170, BI-Rumonge, Burundi, ane_bur@yahoo.fr

Ĉeĥio: Jana MELICHÁRKOVÁ, Polní 938, CZ-696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

Ĉinio: GONG Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, arko.gong@qq.com

Danio: Bent JENSENIUS Højstrupvej 124, DK-2700 Brønshøj, bentjensenius@gmail.com

Finnlando: Sylvia HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, sylvia.h@kolumbus.fi

Francio: Michel DECHY, 65 allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÓRÓDY, E-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, zsosfia.korody@esperanto.de

Hungario: József NÉMETH, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, jozefo.nemeth@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, silkovojo@aliceposta.it

Japanio: ISIKAWA Tiekō, Tate 1-6-6-103, JP-353-0006 Siki-si, Saitama-ken, isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Pedro M. MARTÍN, Arnau Gatell 2, ES-17300 Blanes, ileicat@hotmail.com

Korea Resp.: PARK Yongsung, 110-dong 902-ho, Daewoo lan Apt. Samke-dong, Gimhae Si, Gyeongsangnam-Do, KR-621-750, esabpark@korea.com

SEKCIOJ DE ILEI

(*dairigo*)

Kroatio/KEL: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svijetlana AKIK, Franje Malnara 52, HR-10000 Zagreb, ilei@hes-keu.hr

Kubo: Miguel Angel GONZÁLEZ ALFONSO, Cádiz No. 233 apto. 5 e/ Cruz del Padre y Consejero Arango, Cerro, La Habana, Cuba, info@esperanto.co.cu

Meksiko: Carlos HERNÁNDEZ LOARCA, Arco del Triunfo 2019-40 San Pedrito los Arcos, MX-76148 Querétaro México, ilei@esperanto-mexico.org

Mongolio: Khorloo Tserendejidd, distrikto BZD, 82-5, MN-Ulanbator, tserendjd@yahoo.com

Nederlando: Robert MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, moerbekr@gmail.com

Nepalo: Bharat Kumar GHIMIRE, Nepala E-Asocio, G.P.O. Box, NP-10518, Kathmandu, nespa_bharat@hotmail.com

Norvegio: Anne Karin BONDHUS, Morenefarett 8A, NO-4340 Bryne, akbondhus@jkn.no

Pollando: Tomasz CHMIELIK, ul. Jarzębinowa 3/33, PL-21-040 Świdnik, tchmj@wp.pl

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, mihaitrifoia@yahoo.com

Serbio: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36, RS-32000 Čačak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Suda Afriko: Emile MALANDA NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape Town, emalandan@yahoo.fr

Svedio: Agneta EMANUELSSON, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Mireille GROSJEAN, Grand-rue 9. cp 9, CH-2416 Les Brenets, mireille.mireille@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMADON B., Mensah, B.P. 39, Aneho, TG-Lomé, abiovamensah@yahoo.fr

Ukrainio: Volodimir HORDIENKO, p/k35, Kijiv-133, UA-01133, volodimir@ukr.net

Usono kaj Kanado: Ronald GLOSSOP, 8894 Berkay Avenue, US-63136-5004 Jennings, MO, rglossop@mindspring.com

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP, 70, B20A, Kim Lien, Dong Ha, VN Hanoi, Ngyuennepa9cfl@gmail.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida ELBAKJAN, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, Lidaelb@yahoo.com

Barato/Hinda Unio: Venkatesh REDDY, No. 216, Off Main Road, Whitefield, IN-Bangalore 66, Karnataka, esperovr@yahoo.co.in

Britio: Elizabeth STANLEY, Frome House, Frome Gardens, Stroud, Glos. GL5 4LE, UK elistaros@hotmail.com

Bulgario: Mariana GENCHEVA, Targovska 95, BG-5180 Polski Trambesh, maries972@yahoo.com

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ, Casilla 903, CL-3340000 Curico, hecg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box TS 404, Teshie, GH-Accra, abaako43@yahoo.com

Islando: Loftur MELBERG Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Gian Piero SAVIO, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, saviogp@zahav.net.il

Kongo DR: Viktor LUKOLAMA LUFIMPU, c/o Mampuya Diakiese, B.P. 7598, CILU, RDC Kinshasa 1, viktorkufimpu@gmail.com

Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, adeelbutt84@gmail.com

Rusio: Svetlana SMETANINA, str. Budajskaja 13-35, RU-129128 Moskvo, svsmetanina@yandex.ru

Slovakio: Magdaléna FEIČIKOVÁ, Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, ilei.oficejo@gmail.com

Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, rezamenhof@yahoo.com

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, sonry@adinet.com.uy

KONTAKTPERSONOJ

Aŭstrio: Uwe STECHER, Zauscherbgasse 3/3/6, AT-1210 Wien, punktor@live.at

Bolivio: Leandra DIA RIOS, Calle María Estiváriz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratustra, Villa Pabón, Zona Central, La Paz, milleis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta KULENOVIĆ, Branica Sarajevo 15/V, BA-71000 Sarajevo

Estonio: Helgi HROMOVA, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Haitio: Christine THEANO, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-au-Prince, christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahan, Pejjuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA, Chemomi Estate, P.O. Box 22, KE-30301 Nandi Hills, simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguau@gmail.com

Luksemburgo: Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, moonmont@pt.lu

Portugalo: Luís LADEIRA, Rua Manuel Valadares, 10, 2E PT-2650-192 Amadora luisladeira@portugalmail.pt

Taĝikio: Firdaus SHUKUROV, Glavpochtamt, a.k.135 TJ-734000 Dushanbe, komintel@yandex.ru; aet2005@yandex.ru

Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Ricardo COUTINHO, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE venesperanto@cantv.net



Ekzamensesio dum la 5a Afrika Kongreso de E-o (vd p. 33)



Esperanto efikas kadre de urbaj ĝemeliĝoj (vd p. 24)

En tiu domo okazos ISOA
(vd. p. 32)

